

Recenzo

Blankaj makuloj en la biobibliografio de E.A. Bokarjov

Pri la problemo de la politika oportuno kaj ideologia konformismo en la sovetia Esperanto-movado

La libro de Antonina Bokarjova kun la rememoroj pri ŝia fama patro kaj la sovetia esperantisto kaj (inter)lingvisto Evgenij A. Bokarjov¹ (1904-71), kiu estis eldonita okaze de la 105a datreveno de lia naskiĝo, estis atendita senpacience. Kion novan pri Bokarjov ĝi entenos? Nu, antaŭ ol respondi tiun ĉi demandon ni unue diru, kion ĝi entute entenas. La unua parto estas dediĉita al la vivo kaj biografio de Bokarjov mem – la unuopaj ĉapitroj portas jenajn titolojn: 1. Prauloj, familianoj, parencoj, 2. Dagestano, 3. Kaŭkazologiaj studoj kaj elstaraj lingvistoj en la 1920-1930 jaroj, 4. Instituto pri Lingvo kaj Pensado nome de N. Marr, 5. Dum la milito. En la postmilita Leningrado, 6. En Moskvo. Renovigo de Esperanto-agado, 7. E. Bokarjov kaj la junulara Esperanto-movado, 8. Hejme, en la familio. En la raporto de Bokarjova oni ekscias kelkajn erojn el la vivo de ŝia patro, kiuj ĝis nun eble estis apenaŭ konataj: Laŭ tio jam la prauloj de Bokarjov estis konataj klerigantoj en Dagestano, kie la nomo de lia familio havas fortan lokon kaj ĝuas firman reputacion, ke same lia pli juna frato Anatolij estis esperantisto kaj specialisto pri dagestanaj lingvoj, sed pereis en la unuaj monatoj de la Granda Patrolanda Milito, ke Eŭgeno Bokarjov unue edziniĝis al sia studentino Natalja Gorlova, ke lia posta edzino nomiĝis Agnija Desnickaja* kaj estis disĉiplino de la fama lingvisto Ĵirmunskij,² ke lia filino Antonina naskiĝis en la urbo Ventspils en Latvio fine de la milito, kiam Bokarjov partoprenis la batalon de Ŝliselburgo, ktp.

Troigoj, misproporcioj kaj prisilentoj

Ĉio estas tre interesa, ĉio ekstere brilas, ĉio estas raportita en pozitiva tono pri homo ŝajne senmakula, ajna kritiko forestas. Neniu dubas, ke Bokarjov estis respektinda lingvosciencisto kaj ke ankaŭ la nivelo de lia poresperantista agado estas taksenda kiel “nemezureble alta”, kiel konfirmas la oficiala nekrologo. Jam en la antaŭparolo al la Esperanta-rusa vortaro de 1974 (reeldonita en 1982) Bokarjov estis komparita de sia lingvista kolego V. Grigorev eĉ kun grandkalibraj lingvistoj kiel H. Schuchardt, J. Baudouin de Courtenay, A. Meillet, N. Trubeckoj, O. Jespersen, E. Sapir, A. Martinet, N. Juŝmanov. Fiere la aŭtorino ripetas en sia libro la ateston de tiu apenaŭ superebla honorego.³ Ĉu ankaŭ la aserto de la nekrologo en la sovetia eldono de *Paco*, ke Bokarjov estis la “plej profunda (pli bone: profundega) teoriulo de nia movado”, ne same ŝajnas troigita? Sendube, al Bokarjov apartenas la merito esti restariginta la interlingvistikon kaj esperantologion kaj per tio la Esperanto-movadon mem de post 1956 en Sovetunio pere de kelkaj utilaj artikoloj, prelegoj kaj agadoj. Sed ĉu oni povas kompari la scienc-teorian nivelon de la interlingvistika-esperantologia kontribuo de Bokarjov kun la signifa teoria verkaro de E.K. Drezen, grava nomo, kiu en tiu kunteksto nepre devus esti emfazita?⁴ Pri tio eblas disputi. Mi starigas ĉi tie

¹ La scienca transliterumo estas Bokarëv.

² Plej lasta edzino estis iu Ljudmila Petrovna, kiel oni ekscias en la nekrologo verkita de A.D. Duliĉenko.

³ En prezentoj pri sovetia lingvoscienco Bokarjov kutime ne estis menciita en la sama rango kiel ekzemple Vinogradov, Reformatskij, Uŝakov, Larin, Filin, Ŝĉerba, Bulachovskij, Beloded, Konrad, Jakubinskij, Jarceva, Guchman, Ĵirmunskij, Trubaĉev, Ivanov, Serebrennikov k.a. La nomo de Bokarjov kutime aperis ĉefe en la vico de lingvosciencistoj, kiuj okupiĝis pri kaŭkazaj lingvoj, analoge kiel ekzemple Ariste por la finn-ugraj lingvoj kaj Sevak por armenaj temoj.

⁴ En sia fama artikolo, kiun Bokarjov verkis kun O.S. Achmanova por *Voprosy jazykoznanija* en 1956, la nomo de E.K. Drezen aperis sole en iu piednoto en formo de verkindiko, kio ja ŝajne ne estis tute sufiĉa traktado, sed kio signifis singardan kaj mallaŭtan remencion de ankoraŭ oficiale persekutita kamarado kaj

nur demandojn, sen havi la ambicion ilin respondi. Necesus atente relegi, kompari kaj pritaksi ĉion verkitan de tiuj aŭtoroj.⁵

Dum la Granda Teroro kaj la granda patrolanda milito

Antonina Bokarjova ankaŭ notas per unu sola magra frazo, ke ŝia patro bonŝance evitis la reprezaliojn kontraŭ esperantistoj dum la jaroj 1936-38. Jes, vere bonŝance, ĉar neniu krom denuncema aĉulo povus al li deziri la saman tragikan sorton, kiun spertis liaj Esperanto-kolegoj Drezen, Varankin, Nekrasov, Muravkin, Miĥalskij, Futerfas aŭ Deŝkin, Demidjuk k.m.a.! La stalinisma teroro, kiu rabis la vivon de centmiloj, daŭre estas hontinda kaj dolora ĉapitro patrolanda, kiun multaj rusaj aŭtoroj eĉ nuntempe ankoraŭ hezitas tuŝi. En la libro de Bokarjova ĝi meritis enprofundiĝon, alie ĉio restas tro supraĵa. En la tikla tempo Bokarjov estis okupata pri sia profesia kariero, verkante disertacion, por en 1939 povi ekstudi kiel doktoriĝanto de la Instituto pri Lingvo kaj Pensado de Nikolaj Marr en Leningrado.

Kiel oni legas en nekrologoj, Bokarjov defendis la patrujon kiel volontulo en la kolonoj de la defendantoj de Leningrado, kie li batalis kiel soldato de marbrigado ekde la 11a de septembro 1941. Li estis grave vundita kaj longan tempon troviĝis en la hospitalo. En 1946 li revenis hejmen, havante la rangon de majoro, “kun militordeno kaj medaloj sur la brusto. Kaj ni ĝis la lastaj liaj tagoj eĉ ne suspektis pri liaj heroaj agoj kaj meritoj!” (Sulje).

Post la milito la juna kariero translokiĝis al Moskvo, kie estis fondita la Instituto pri Lingvoscienco, al kiu li aliĝis. Sed kion Bokarjov vere sciis pri la eventoj ĉirkaŭ la sovetia Esperanto-movado dum la stalinismaj persekutoj en la 30aj jaroj, kion li neniam povis aŭ volis komuniki al la posteuloj post la morto de Stalin, eĉ kiam la unuaj rehonorigoj de viktimoj jam okazis? Nu jes, mi scias, ke publike skribi pri ĉi tiu temaro longtempe ne eblis, tiel ke antaŭ la Gorbaĉova erao inter la sovetianoj regis nur nebulaj imagoj kaj malforta intereso pri la stalinismaj fifaroj, kiujn oni prefere ne menciis kaj sufokis.⁶

Interesa en tiu ĉi kunteksto estas la sciigo de Bokarjova, ke “li neniam parolis pri siaj kontaktoj kun superuloj, sed mi certas, ke tiamaj burokrataj instancoj forprenis multe de lia sano, kiu estis jam malforta. Lia granda merito estis tio, ke malgraŭ ĉiuj aĉaĵoj⁷ kaj la neceso ĉiam pruvi la porsovetan karakteron de Esperanto, li daŭrigis sian agadon, klopodis ĝis la lastaj momentoj pri la afero de la tuta sia vivo.” La komenco de ĉi tiu frazo indikas, ke ĉe Bokarjov devis ekzisti certaj tabuoj.

Malamiko de Marr

Dum Stalin estas en la libro apenaŭ konsiderata, Bokarjova longspire dediĉas sin al Nikolaj Marr kaj la faroj en la Marr-instituto ĝis pli malpli la jaro 1956. Kiel la aŭtorino prave skribas, Bokarjov neniam estis adepto de Marr (kiu mortis en 1934). En tempo, kiam Marr ŝajne simpatie rilatis al la demando de la internacia lingvo ĝenerale kaj al Esperanto aparte, interlingvistoj kiel Drezen, Spiridoviĉ kaj Andreev evidente kredis blinde en la ŝajnan avangardecon de la marrismo, en kiu ili kredis esti malkovrintaj la fundamenton por la nova marksisma lingvoscienco kaj por la

samideano (E.K. Drezen estis oficiale rehonorigita de la sovetiaj instancoj nur en majo 1957). Anstataŭ pri Drezen Bokarjova skribis tutan alineon pri E. Polivanov.

⁵ La listo de publikigitaj interlingvistikaj-esperantologiaj verkaĵoj de Bokarjov estas magra kompare kun aliaj aŭtoroj. Kiel M.I. Isaev atentigis (en Problemy interlingvistiki, 1976, p. 8), Bokarjov preferis prelege, do buŝe prezenti siajn temojn sen pretigi prespretan manuskripton.

⁶ Bokarjov forpasis antaŭ ol aperis la verkoj de A. Solĵenicin, precipe ‘Gulaga Arkipelago’ (1973), kaj ‘7000 tagoj en Siberio’ de Karlo Ŝtajner (1975), kiu aperis en Esperanto-traduko en 1984.

⁷ Bokarjova ne klarigas, pri kio tiuj „aĉaĵoj” temas.

interlingvistiko mem, dum Bokarjov reagis kun skeptiko. Sian negativan sintenon pri la spekulaciaj teorioj de Marr, kiujn li formulis kadre de la ‘Nova instruo pri la lingvo’, Bokarjov atestis jam en la artikolo ‘Lingvoscienco kaj marksismo’, aperinta en *Meždunarodnyj jazyk / Internacia Lingvo*, n-ro 4-5/1929, do en epoko, kiam la marrismo fariĝis kvazaŭ la ŝtata doktrino en la sovetia lingvistiko. Sendube tio estis kuraĝa elpaŝo de Bokarjov, ĉar kritiki temojn, kiuj havis la benon de Stalin, povis esti ligite kun malavantaĝoj. En 1950, kiam en la gazeto *Pravda* Stalin – evidente en kunlaboro kun la lingvisto A. Ĉikobava kaj aliaj kartvelaj gravuloj⁸ – persone kondamnis la marrismon kiel pseŭdosciencan kaj kiel nemarksisman lingvistikon, montriĝis, ke Bokarjov pravis. Tio estis nekredebla sensacio, pri kiu hodiaŭ apenaŭ iu plu konscias!

Stalinismaj artikoloj en *Voprosy jazykoznanija*

La aserto de Bokarjova, ke ŝia patro neniam partoprenis politikajn diskutojn por nenigi marristojn, tamen ne estas tute ĝusta; du artikoloj de Bokarjov, kiuj aperis en n-roj 2/1953 kaj 6/1954 de *Voprosy jazykoznanija*, la ĉefa organo de la sovetiaj lingvosciencistoj, parolas alian lingvon. En 1953 Bokarjov – ni troviĝas en la malfrua stalinisma periodo de la sovetia lingvistiko – debutis en tiu revuo per recenzo pri la ĵus aperinta libro de V.V. Vinogradov kaj B.A. Serebrennikov, du gvidaj sovetiaj lingvistoj, kiuj aprobis la kondamnon de la marrismo. Ilia libro kun la titolo ‘Kontraŭ la vulgarigo kaj tordo de la marksismo en la lingvoscienco’ estis eŭforie laŭdata de Bokarjov. Utiligataj estas la plena stalinisma ĵargono, inkluzive de pejorativoj kiel “arakĉeeva reĝimo”⁹, “kabinetuloj”, “talmudistoj”¹⁰, “nihilisma”, k.s., kiu tiam estis moda por diskrediti la marristojn (inter ili Meŝĉaninov-on, kiun Bokarjov laŭdire tiom estimis). Tiu recenzo, kiu gloris la “genian” lingvistikan verkon de Stalin, ankoraŭ aperis en la sama eldono de *Voprosy jazykoznanija*, en kiu la morto de Stalin estis oficiale anoncita.

Alia mirinda artikolo de Bokarjov aperis en la sama revuo fine de 1954. Ĉi tiu kontribuado, kiu estis kunsuskribita de la supre menciita Serebrennikov, portis la titolon ‘Stalin – granda daŭriganto de la verko de Lenin’ kaj estis publikigita okaze de la 75-jariĝo de la forpasinta unua estro de la sovetia ŝtato. En tiu altgrade konformisma artikolo estis ripetita la tuta glorada litanio. Estis skribite, ke Stalin “donis sian tutan vivon al la lukto por libereco kaj feliĉo de la laborista popolo”, “luktis kontraŭ trockistoj, buĥarinistoj kaj burĝaj naciistoj”, “donis profundan ĝeneraligon de la nova sperto de la historia evoluo, de la lukto de la laborista klaso kaj ĝia Komunista Partio cele al la konstruado de la socialismo en nia lando”, “antaŭenigis kaj evoluigis serion da novaj pozicioj de la marksisma-leninisma teorio”, “pruvis la neeviteblon de la plua profundigo kaj akriĝo de la kontraŭdiroj de la kapitalismo, kiuj kondukos ĝin al pereco”, “formulis la bazan ekonomian leĝon de la socialismo, lumigis la vojojn kaj metodojn de la socialisma industriigo kaj kolektivigo de la agrikulturo”, “evoluigis kaj konkretigis la marksisman-leninisman instruon pri la ŝtato, partio kaj pri la transiro de la socialismo al la komunismo”. Krom tio estis atentigite, ke “grandan signifon la verkaĵoj de Stalin havas ankaŭ rilate la nacian demandon”, kaj nelaste ke “en la laboraĵoj de Stalin ĉiuj bazaj problemoj por la marksisma lingvoscienco ricevis sian pluan evoluon.” En tio “aparte gravan rolon en la ellaborado de la marksisma scienco pri la lingvo ludis la verkaĵo de I.V. Stalin ‘Marksismo kaj la demandoj de la lingvoscienco’.” Ktp. Eĉ la fakto, ke Stalin “brile refutis la kontraŭmarksisman teorion de N.Ja. Marr pri la klasa karaktero de la lingvo” estis remaĉita, kio signifis, ke la resta parto de la artikolo estis dediĉita al la “disbato” de la marrismo kaj al la utileco de la laŭdinda stalina ‘lingvosciencia’ verkaĵo el la jaro 1950. El hodiaŭa perspektivo oni povus

⁸ Ankaŭ Marr estis kartveldevena.

⁹ Aludo al la regado de la grava kaj influa rusa politikisto, grafo kaj generalo A.A. Arakĉeev (1769-1834), kiu praktikis brutalan militistan reĝimon en la tempo de la caro Aleksandro I., ekde 1817. Lia nomo fariĝis metafora kaj simbola por la despotismo en la rusa politiko sub la caroj. La uzita terminologio de la stalinistoj estas tre interesa kaj karakteriza por ilia periodo.

¹⁰ En ĉi tiu uzado antisemitisma implico estas klare rimarkebla.

supozi, ke unu kaj duono da jaroj post la forpaso de Stalin tiaj himnoj je la ŝajne senmorta sovetia gvidanto ne plu necesus, despli ke Berija, alia furio de la sovetia persekuta aparato, mortis. Tamen, la fama parolado de Ĥruŝčov, per kiu en februaro 1956 estis kondamnitaj la kulto de personeco de Stalin kaj la krimoj de la stalinismo, estis ankoraŭ atendota. Do, oni troviĝis en ideologia kaj politika vakuo, la spirito de Stalin ankoraŭ iom vivis, kaj dume alia opinio ol la oficiale valida ne povis esti publikigita. Sed post 1956 la nomo de Stalin praktike malaperis el la oficialaj sovetiaj presaĵoj, ankaŭ lingvistikaj. En la fama artikolo de 1956, kiun Bokarjov verkis kun Olga Aĥmanova por *Voprosy jazykoznanija*, reanoncanta la ekziston de la interlingvistiko, esperantologio kaj Esperanto mem en Sovetunio, Marr entute ne estis menciita inter la prezentitaj lingvistoj, ludantaj ian rolon en la historio de la internacilingva demando. Kaj en tiu sama artikolo ankaŭ la sensaciaj lingvistikaj opinioj de la laŭdire genia kamarado Stalin, esprimitaj en *Pravda* en 1950, jam ricevis nenian atenton. Tiel ankaŭ Bokarjov adaptis sin al la ŝanĝiĝantaj politikaj premisoj – por finfine reveni al iu normaleco kaj racieco en la lingvoscienco, kiu estis libera de fantazia ideologia balasto, sed ankaŭ de nedezirataj nomoj.

Ĉi tiuj ĉi tie de mi prezentitaj cirkonstancoj neniam estis menciitaj en iu oficiala biografio pri E.A. Bokarjov, kaj ili mankas ankaŭ ĉe Antonina Bokarjova, tiel ke oni ne scias, ĉu Bokarjova konis aŭ ne tiujn tekstojn subskribitajn de sia patro, kiuj malkaŝas la identecon de nia heroo kiel ĝisosta stalinisto, aŭ ĉu ŝi simple prisilentis ilin. Mi mem remalkovris tiujn tekstojn antaŭnelonge, trafolumante la jarkolektojn de *Voprosy jazykoznanija*, kiuj estas alireblaj nun ankaŭ en interreto.¹¹

La imperiisma angla lingvo ktp.

Ne estas la loko kaj spaco ĉi tie por detale recenzi la publikigitajn tekstojn el la plumo de Bokarjov en la dua parto de la libro,¹² sed mi volus aldoni nur du-tri konsiderojn. El tiuj tekstoj eblas ekscii ne nur la sufiĉe klaran pozicion de Bokarjov koncerne multajn lingvistikajn demandojn, sed inter alie ankaŭ lian – grandparte ideologie-politike influitan – opinion pri la aktuala situacio de la rusa kaj angla lingvoj kaj pri la supozita estonteco de la planlingvoj, antaŭ ĉio de Esperanto. En la tekstokolekto mankas la parolado de Bokarjov, kiun li prezentis la 24an de januaro 1956 antaŭ la Sciencula Konsilio de la Lingvosciencia Instituto de Akademio de Sciencoj de UdSSR kaj kiu estis publikigita en la ruslingva broŝureto ‘Problemoj de interlingvistiko’ (Moskvo 1976). En ĉi tiu prelego Bokarjov (milde) polemikis kontraŭ la decido de certaj okcidentaj instancoj subvencii la disvastigon de la angla kiel internacia lingvo. La trajtojn de la proponoj disvastigi la anglan kaj francan lingvojn en formo de bilingvismo Bokarjov nomis imperiismaj.

En sia memorinda GDR-parolado de 1967 Bokarjov revenis al la internacia rolo de la angla lingvo, per jenaj konsideroj: “Oni ofte parolas precipe en okcidenta literaturo, ke tia lingvo devas esti la angla. Jes, la angla estas la plej uzata en internaciaj rilatoj. Sed disvastigeco de la angla lingvo jam atingis sian apogeon, kaj ni vidas jam: en kelkaj terenoj ĝi komencas perdi sian

¹¹ Mi detale traktas tiun temon kadre de mia disertacio pri la historio de la orienteŭropa planlingva movado.

¹² Temas pri jenaj tekstoj: La internacia lingvo kaj la scienco pri lingvo (aperinta en 1928 en la gazeto *Meždunarodnyj jazyk / Izvestija CK SESR*); La nuntempa stato de la demando pri internacia helpa lingvo (publikigita en la libro ‘Problemy interlingvistiki’ en 1976); La internacia helplingvo kiel lingvistika problemo (verkita kun O. Aĥmanova por *Voprosy jazykoznanija* en 1956); Esperanto, la lingva kreaĵo de Zamenhof (aperinta en la Memorlibro pri la Zamenhof-jaro de 1960); La internacia lingvosituacio kaj eblecoj de raciigo (parolado farita en GDR en julio 1967); 64 lingvoj... kaj ankoraŭ unu (aperinta en *Literaturnaja gazeta* en 1968); La akcento en artefaritaj internaciaj lingvoj (studo eldonita en iu libro en 1991); Pri la rusa-esperanta vortaro (informo aperinta en ‘Por la paco’ II, Moskvo 1964). Aldonitaj estas du nekrologoj skribitaj de Nina Sulje kaj A.D. Duliĉenko, inkluzivitaj estas la traduko de Attalea Princeps de Vsevolod Garŝin, kiun Bokarjov faris en 1923, poemo de Aleksandro Logvin el la jaro 1971 kaj baza listo de la uzita fakliteraturo. Oni estus povinta publikigi ankaŭ la artikolon de M.I. Isaev pri ‘E.A. Bokarev kaj interlingvistiko’, aperinta en la libro ‘Problemy interlingvistiki’, Moskvo 1976.

privilegian situacion. Mi povas citi nur unu fakton, Hindion, kie ĝis la lastaj jaroj la angla lingvo estis oficiala ŝtata lingvo, sed nun ĝi perdis sian rolon de ŝtata lingvo jure.” Sian interlingvistikan teorion Bokarjov resumis en la sama parolado jene: “Artefarita lingvo venkos, se ĝi estas konforma al sociaj bezonoj de la tempo, de la medio ktp. Kaj kontraŭe, ĝi ne venkos se ne ekzistas kaŭzoj por ĝia ekzistado. Sekve, se ekzistas seriozaj kaŭzoj por ke artefarita lingvo fariĝu internacia, ĝi estos internacia, sed se ne ekzistas sufiĉaj kaŭzoj por venko, do tiam artefarita lingvo ne enradikiĝos. ... do la venko de nia lingvo estas tute klara kaj komprenebla.” Kaj pri la evoluo de la rusa lingvo, en 1976: “Antaŭ kvindek jaroj, ekzemple, la internacia rolo de la rusa lingvo estis tre malgranda; nun ĝi estas unu el influegaj internaciaj lingvoj, havanta larĝan disvastiĝon en la tuta mondo.”¹³ Mankas ĉi tie la spaco por komenti tiujn eldirojn, sed mi pensas, ke la citaĵoj estas pridisputeblaj kaj parolas por si mem.

La embarasa *Paco*-artikolo de 1968

Kiam en 1968 okazis la invado kaj okupo de armeoj de la Varsovia Pakto en Ĉeĥoslovakio, la sovetia eldono de la Esperanto-revuo *Paco* tute ne prisilentis ĉi tiun eventon; male, ĝi eĉ traktis ĝin, kvankam laŭ la propra maniero de la komunismaj ideologoj. En artikolo sub la dubinda titolo ‘Luktante por la homaj rajtoj’ Bokarjov, tiam kun la oficiala funkcio de prezidanto de la komisiono pri internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj, rajtis verki la ĉefartikolon de tiu eldono de *Paco*. “Komplikaj okazintaĵoj, kolizioj, konfliktoj markis la pasintajn monatojn de la jaro 1968” li skribis, por atentigi, ke en la kvindek unua jaro post la Granda Oktobra Socialisma Revolucio¹⁴ Unuiĝintaj Nacioj deklaris ĝin Jaro de la homaj rajtoj. Vide al la giganta lezado de la homaj rajtoj pro kaj sekve al tiu ‘revolucio’ en Sovetunio¹⁵ la komparo ne povintus esti pli cinika, opinias almenaŭ mi mem. La polemiko de *Paco* direktis sin unuavice kontraŭ vico da membroŝtatoj de tiu mondorganizaĵo, kiu “daŭrigas sian barbaran invadon” en Vjetnamio, sed ankaŭ en “la multsuferanta Greklando”, kie “furiozas la militema faŝista diktaturo de la ‘nigraj koloneloj’”. Plue: “En FRG aspiras ekposedi regpovon novfaŝismo, kaj la ‘eksterordinaraj’ leĝoj subfosas la formalajn ‘liberojn’, kiujn oni proklamis en la okcidentgermana konstitucio.” “Kaj en Hispanio, kie ĵus okazis la 53a Universala Kongreso de Esperanto, jam kelkajn jardekojn regas la reĝimo, seniginta la laborulon de la plej fundamentaj rajtoj...”. Krome, “la rasista registaro de Sud-Afrika Respubliko estas pelinta trans pikdraton de la rezervejoj milionojn da loĝantoj;” “Ameriko, la ŝtato, kiu tiel reklamas sian ‘liberecon’ – Usono, kies trupoj tretas nun la tutan mondon, minacante per atako al ĉiuj, kiuj kuraĝas batali por sia nacia sendependeco, – tiu ŝtato montras ekzemplojn de ekstermo de la rajtoj, enskribitaj en la Deklaracio.” La agreso de la Varsovia Pakto kontraŭ Ĉeĥoslovakio estis pravigita kiel (mem)defendo kontraŭ la “intrigoj de la imperiismo kontraŭ la socialismaj landoj”. Estis promesite, ke “la trupoj de la uniaj landoj, provizore enirintaj la teritorion de Ĉeĥoslovakio, ne miksiĝos en la internajn aferojn de Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko”. Ne necesas komenti ĉi tie la dubindecon de tiuj asertoj, pri kiuj nuntempe ĝenerale regas historia

¹³ Pri la analoga – imperiisma – rolo de la rusa lingvo kompreneble regis strikta silento, ekzemple la deviga instruado de la rusa lingvo en la satelitaj ŝtatoj, kie tiu lingvo tute ne estis ŝtata kaj sekve malbone regata de la ĝenerala lernpubliko (precipe ĝuste en ‘frataj landoj’ kiel Pollando, GDR, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Rumanio). Ankaŭ ĉi tiu temo fakte ĉiam restis tabua kaj publike ne traktita de la sovetiaj lingvosciencistoj. La tutsovetie domina rolo de la rusa lingvo estis pravigita de la sovetiaj ideologoj kaj lingvopolitikistoj (kiel ekzemple M.I. Isaev) per la atentigo, ke Lenin estis kontraŭ la funkciado de la rusa lingvo kiel ŝtata lingvo kaj ke tiu ĉi lingvo ludas en Sovetunio nur la rolon de inter-nacia (ruse: meĝnacionalnyj) lingvo inter la sovetiaj popoloj. Objektiva diskuto pri la katastrofaj sekvoj de la sovetia lingvopolitiko por la etnaj lingvoj en unuopaj naciaj respublikoj estis nete evitata.

¹⁴ Ankaŭ tiun ĉi titolon oni devus meti inter krampoj, ĉar kiel konate tiu evento ne estis revolucio (sed puĉo), nek socialisma (sed bolŝevista-leninista), krome ĝi estis en la komenco nek granda kaj ankaŭ ne okazis en oktobro, sed en novembro, laŭ la sovetia kalkulo.

¹⁵ Konsultu la ‘Nigran libron de la komunismo’ kaj la fakan literaturon.

klareco, eĉ en Ruslando.¹⁶ Nur tiom: Oni ja sendube rajtas kritiki la teruraĵojn en certaj landoj, sed oni ne forgesu trakti ankaŭ la mizeron en la propra domo. Kompreneble, pri la (mizerega) situacio en la sovetia imperio mem mankis ia ajn komento en *Paco*; anstataŭ tio estis aldonita la frazo, ke “en 1917, kiam unuafoje en la historio la laboristoj, soldatoj kaj kamparanoj de Rusio sub gvido de la komunista partio komencis realigi en la vivo siajn homajn rajtojn.“ Eĉ la “agantoj de la esperanta movado, kiuj deklarante sin ’neŭtralaj’ kaj ’elstarantaj ekster politiko’, kiuj ne deziras rimarki la agresan politikon de imperiismo“, estis eksplicite “kondamnitaj“. La revuo *Esperanto* estis akuzita, ke ĝi faras “malverajn kaj malĝustajn elpaŝojn“ kaj “falsigas la veran vizaĝon de la organo de UEA“.¹⁷ Poste sekvis frazo pri la “gloraj dekretoj de Lenin“, kiuj “estas efektivigitaj en nia lando, konstruanta nun komunisman socion“.

Ankaŭ la ĉi-lastata epizodo, trovita en *der esperantist*, principe ne manku en bokarjovaj postrikoloj. Temas pri la funebra ceremonio por E.A. Bokarjov en Moskva Instituto de Rusa Lingvo, kies etoso estis priskribita de T. Kulagin jene: La 15.3.1971 okazis funebra adiaŭo kun la forpasinta prof. E.A. Bokarev, kiun ĉeestis multe da liaj kunlaborantoj kaj gesamideanoj de Moskvo. En la mezo de granda halo en ruĝkolora ĉerko, dronanta en floroj, kuŝis la mortinto. Apude en flanko staris multaj kronfloroj, ornamnitaj per ruĝaj kaj nigraj rubandoj, inter kiuj estis florkorono de Moskvaj Esperantistoj, kun verdaj rubandoj kaj deca esperantlingva surskribo. Mallaŭta melodio de funebra muziko estas aŭdata. En strikta silento apud la ĉerko staris po 4 personoj dum 5 minuta honora gardado, inter kiuj estis ankaŭ Moskvaj gesamideanoj. Dum la funebra mitingo parolis multaj, konintaj la profesoron, personoj, ankaŭ esperantistoj pri la sciencaj kaj esperantaj meritoj de la forpasinto.”

Bokarjova laŭdis la karakteron de Bokarjov, kiu “respondis al la plej bonaj esperantistaj kvalitoj: neprofitemo, takto, respekto al aliaj opinioj, sciavido, intereso al aliaj personoj, amikemo, aprezo de la spirito de komuneco. (...) Li neniam strebis akiri ion por si mem.”

Nina Sulje skribis en la koncerna nekrologo, ke “E.A. Bokarjov estis ĝis la profundo de sia animo ruso kaj samtempe konvinkita internaciisto”.

Fine estu cititaj jenaj linioj el poemo de Aleksandro Logvin ‘Memore al E.A. Bokarjov’:

Gvidanta estis via volo
...
por paco, amikec’ popola,
kontraŭ militaj fi-instigoj !

Al vi, amik’ de Esperanto,
...
al vi, porpaca batalanto,
“adiaŭ” diras amikaro...

¹⁶ Kvankam la ruslandanoj daŭre emas kredi la sovetian version de la historio - sub Putin/Medvedev ja okazas novaj provoj ideologie manipuli la historian faktecon kaj memoron en la direkto de pozitiva percepto de Stalin kiel ŝtata gvidanto (vd. ekzemple la oficialan lernolibron de Vdovin/Barsenkov), kvankam li en nemezurebla amplekso lezis la homajn rajtojn.

¹⁷ Laŭ mi nek *Esperanto* nek UEA mem ion intence falsis, sed nur silentis, sub la protekto (pli bone: preteksto) de sia iom dubinda politika neŭtraleco, pri certaj politikaj problemoj en la socialisma bloko, evidente por ne endanĝerigi la aferon de Esperanto en tiuj landoj aŭ simile. Tiel, tra la oficialaj landaj asocioj, UEA iusence kaj ĝis iu grado eĉ mem riskis fariĝi la komplico de la komunismaj reĝimoj en tiuj landoj, por ricevi iliajn agnoskon kaj apogon, en la naiva kredo, ke Esperanto tie povus venki.

Mi lasas tiujn patosajn asertojn senkomentaj kaj rezignas ankaŭ pri fina komento. La ‚objektiva‘ biografio de E.A. Bokarjov ankoraŭ estas verkota.

Por eviti miskomprenon: En mia recenzo mi ne celis ataki E.A. Bokarjov, sed montri la historiografiajn truojn en lia biografio publikigita de lia filino A. Bokarjova, kun la celo konstrui senmakulan miton pri fama sovetia esperantisto, kies politika sinteno estas grandparte prisilentata kaj devus esti, laŭ mi, pli kritike rigardata.

Andreas Künzli , 2012

Bokarjova, Antonina: Sciencisto, esperantisto, patro: Eŭgeno Bokarjov. Al la 105-jara jubileo de Eŭgeno Bokarjov. Impeto. Moskvo 2010. 143 p.

* Kiel A. Bokarjova komunikis en sia posta komento sur

<http://www.esperantio.net/index.php?id=1996>

“A. Desnickaja neniam estis edzino de Evgenij Bokarjov, sed lia bofratino – edzino de lia pli juna frato Anatolij”.